



Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago,

Nº 2, Februaro 2007



Dalai-lamao disdonis Tinĉjon en Esperanto

Dalai-lamao, la spirita gvidanto de multaj tibetaj budhanoj, fine de 2006 transdonis la premion “Lumo de vero” al fondaĵo Hergé pro la bildstria verko “Tinĉjo en Tibeto”. Lige kun la ceremonio, oni disdonis al la ĉeestantoj ekzemplerojn de la esperantlingva eldono de la verko. Esperantistoj ŝajne ne ĉeestis dum la ceremonio, sed laŭ neesperantista ĉeestinto, la esperanta versio estis disdonita “kun la espero, ke iam ni ĉiuj parolos la saman lingvon”. La premio “Lumo de vero” estas disdonata ĉiujare de la Internacia Kampanjo por Tibeto. Ĝin ricevas personoj kaj institucioj, kiuj faris “signifajn kontribuojn al la tibeta batalo por homaj rajtoj kaj libereco”.

Ĉi-jare estis du premiitoj. Unu estis la sudafrika ĉefepiskopo Desmond Tutu, kiu ricevis la distingon pro sia strebado por fortigi la rajtojn de subprematoj, kaj pro sia klara subteno al la rajtoj de tibetanoj.

La alia premiito ĉi-jare estis la fondaĵo Hergé, kiu estis premiita pro ĝia subteno al la heredaĵo de la forpasinta aŭtoro de Tinĉjo en Tibeto, Georges Remi (alinome Hergé). La franclingva versio de la verko estis publikigita en 1959, en la sama jaro kiam ĉinaj trupoj komplete ekregis Tibeton kaj Dalai-lamao fuĝis el Tibeto al Barato.

Tinĉjo en Tibeto estas unu el la plej popularaj verkoj en la mondfama serio de bildstrioj pri la knabeca ĵurnalisto. La libro rakontas pri la amikeco inter Tinĉjo kaj la tibeta knabo Chang, kiu travivis flugakcidenton en la montaro. Kiam Tinĉjo venas savi sian amikon, li renkontas tibetajn monaĥojn kaj la mitan neĝoviron.

La premio, en formo de tibeta buter-lanterno, estis akceptita de la vidvino de Hergé, Fanny Rodwell. Grava kialo de la premiado estis la sinteno de Hergé en rilatoj kun ĉina eldonisto de Tinĉjo. Kiam la verko aperis ĉinlingve, ĝi estis nomita Tinĉjo en ĉina Tibeto. Hergé kaj lia eldonejo protestis, kaj la ĉina flanko konsentis aperi la verkon kun la origina titolo.

ANONCO: La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko havas novan direktoron por la Centra Oficejo. La estraro de ELNA aprobis la proponon, ke Vilĉjo Harris servos komence de la 15a de februaro, 2007. Li antaŭe servis kiel kasisto de ELNA kaj estro de la Komitato pri Membreco.

55-a Kongreso de ELNA

Tiĥuano, Meksikio, 27-30an de Julio 2007

Mar Kárdenas, Garymar2000@aol.com



Kaj societanoj kaj legantoj, la redakcio sincere gratulas vin okaze de

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO 19-25 FEBRUARO 2007!

“Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj”. Erik Carlsson

La severaj veter-kondiĉoj, ne kutimaj eĉ por “norda” Ŝikago, ne permesis al nia s-ro G. Dolgin atingi la klubejon kaj ni malhavis eblecon aŭskulti lian prelegon pri la vojaĝo kiel volontula servisto al Israelo. Espereble, ni faros tion iom poste, printempe. Pasintjare, decembre mi mem faris mian unuan E-vojaĝon tra la Usono kaj vizitis La Verdano Domon de Arizono. Pri tiu unika domo vi povas ekscii de Jarlibro, sed tute mankas informon sur la oficiala retejo de ELNA, eĉ pli – mankas iu ajn informo pri gesamideanoj en Arizono, ŝajnas, ke tie situas E-dezerto. Mia vizito pruvis la malon. La Domo prosperas sub la gvido kaj zorgeco de s-ino Anĝelina: vi povas bone ripozi tie, naĝi eĉ decembre (kion mi faris), uzi E-bibliotekon, ekskursi tra la Fenikso, Arizono, kiun ofte nomas kiel ŝtato de Granda Kanjono. Vizitindaj estas rezervejoj de lalokaj amerikanoj, Muzeo de Indiana kulturo, la Kanjon mem kun urbeto Sedona, universitata urbeto Tempe. Informon vi povas ĉerpi de: <http://verdadom0.tripod.com>. Alia interesa viro – prof. Edwin Grobe – eldonis kelkajn siajn E-librojn. Bv legi la suban poemon el “Arizona sonetaro”:



Apaĉa Irejo

Oriente de Fenikso, en Superstiĉa
Montaro, spirale, serpentume, deklive,
Supren, malsupren, transplataĵen, ĉirkaŭklife,
Interrokege, superkanjone, laŭ riĉa
Starejo da multspecaj kakttoj, ni veturas
Laŭ antaŭa Apaĉa Irejo, pensante
Ajnmomente enfali ravinon, timante
Ekrenkonti tian sorton, kian aŭguras
Holivudaj vakerfilmoj. Tute turisme
Nia buso ekhaltas kaj nia gvidanto
Anoncas fotipaŭzon. Grandegaventure
Ni elbusiĝas kaj amase, optimisme,
Alkuras belvederon, kie sen peranto
Fotas eksan masakrejon, tute sekure.

NOVAĴOJ en ESPERANTUJO

* Universitata radio en Italujo dissendas informojn pri Esperanto kaj kurso de Esperanto. Ili bezonas salut-poŝtkartojn el la tuta mondo por montri ke efektive ekzistas esperantistoj en la tuta mondo.

* De preskaŭ 30 jaroj, ne pasis somero sen la tradicia renkontiĝo je Mediteranea Maro en Sète (Sud-Francio). La 33a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO en SETE okazos de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto 2007. Nova teamo daŭrigas la laboron de s-ino Yvette VIERNE kaj bonvenigas vin en granda parko je 50 m de plago. Por pliaj informoj kontaktu: ESPERANTO KULTURO kaj PROGRESO 10, impasse école J.Ferry, FR-34290 Servian, tel/fakso: 33(0)4 67 39 16 30, rete: jf.passarella@free.fr

* La hungarlingvaj fabeloj apartenas al “perloj de la hungara infanliteraturo”. La fabeladresoj estas: “Kapreoleto de olda onjo” kaj “Kapreolavinjo”. La kunultradukantoj estas: Lászlóné Pásztor kaj D-ro Endre Dudich. La sinjoro profesoro estas unu revizianto de nia gazeto Nordhungaria Informo, kaj honora prezidanto de HEA. La fabelon ornamas desegnaĵoj de mia patro: D-ro Ferenc (Francisko) Földi. La atingebleco de la fabeloj estas: <http://mek.oszk.hu/04400/04419>

* La 24-an de januaro forpasis s-ro René Llech-Walter, kiu festis sian 100-an naskiĝdaton la 30-an de marto pasintjare. Ekde 1932 ĝis sia morto li estis delegito de UEA en sia hejmurbo Perpignan en Francio. Li estis estrarano de UEA 1955-1964 kaj prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto 1957-1967, kiu poste elektis lin honora prezidanto. Li estis dumviva membro de UEA kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Llech-Walter estis konata kultur-aganto inter katalunoj en Francio. En 1982 la franca edukministerio rekonis lian aktivadon per sia plej grava distingo, la rango de Komandoro en la Ordeno de Akademioj Palmoj. Ĉambro en la Centra Oficejo de UEA portas lian nomon memore al lia kontribuo por aĉeti la domon de la Asocio en Roterdamo komence de la 60-aj jaroj.

* Mechak Ezin, arigbo68@yahoo.fr, estas benina esperantisto, kiu nepre volas korespondi kun dana kaj kun usona e-isto Guillermo Bes Salazar, Guillermo@cies.ciges.inf.cu, kuba kuracisto volas korespondi kun usona e-isto

Jen la informoj pri nia sekvantaj kunsidoj:

28an de Februaro – d-ro **Lešek Kordylewski** prelegos pri Rajtigita mortigado.
27an de Marto – Pri iranaj (persaj) kutimoj kaj tradicioj informos **Sepideh Laal**.
24an de Aprilo d-ino **Gertrude Novak** rakontos pri sia vojaĝo al Irlando
22an de Majo **Karlo Offutt** prelegos pri E-komponisto Lou Harrison.

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj

